N-o 1. 1935. 10. I.

# BULTENO

## DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefona n-ro 718-41.

Redaktas: Dr. ST. KAMARYT, Dr. A. PITLÍK

Senpage por membroj de Ĉs. Asocio Esperantista. Aperas sesfoje dum la jaro.

# Samideanoj! Jaro 1935!

Dík především přijměte všichni přátelé, kteří pomohli ať aktivní spoluprací, ať pouhým členským příspěvkem, získati výsledky, jichž náš Svaz dobyl v uplynulém roce!

Prosba! Posílali jsme svůj věstník (Bulteno) poměrně na mnohé adresy. Informovali jsme jím čtenáře o rozvoji našich prací. Bohužel ne všichni, kteří věstník dostávali, zaplatili za minulý rok členský příspěvek. Těch prosíme, aby neodkládali poukázati nám připojenou složenkou nepatrný peníz Kč 16·— příspěvku za rok 1934.

Nový rok! Zůstaňte nám věrni i v roce 1935! Ten bude znamenati velmi významný rok v našem hnutí, neboť v něm začíná naše mezinárodní ústředí zreorganisované a s novými vůdci svou činnost. Bohužel u nás budou chyběti pracovité a zkušené ruce a mozky manželů Sklenčkových. Zatím bude náš výbor přijímati též příspěvky pro UEA a člen jejího předsednictva dr. Kamaryt převezme zatímně kontrolu inkasování příspěvků. Všichni členové UEA četli již poslední číslo jejího orgánu „Esperanto". Znají již peníze příspěvků pro různé kategorie členů. Příspěvky pro člena s Jarlibro (MJ) a pro člena podporujícího (MS) zůstaly beze změny, přes zvýšený kurs švýcarského franku. Příspěvek pro člena předplatitele bylo nutno zvýšiti na 60 Kč. Odporučujeme všem svým členům, aby zaplatili co možná brzy své příspěvky. Použíti mohou k tomu všech našich složenek.

Místní delegáti svolejte členy, odporučte jim složiti příspěvky a pošlete nám je co nejdříve! Budeme též velmi vděčni za všechny zprávy o tom, jaké mínění mají členové o novém stavu UEA a jaká hlediska odporučují našemu Svazu.

Dankon antaŭ ĉio akceptu ĉiuj samideanoj, kiuj helpis per sia aktiva kunlaboro aŭ per sia kotizo akiri rezultatojn, kiujn estas akirinta nia asocio dum la jaro pasinta.

Peto! Ni sendadis nian Bultenon al relative tre multaj adresoj. Ni informis per ĝi la legantojn pri disvolviĝado de niaj laboroj. Bedaŭrinde ĝis nun ne ĉiuj ricevantoj de la Bulteno pagis la asocian kotizon. Ili bonvolu ne prokrasti sendi al ni tuj la kotizon 1934, la sumeton de Kč 16·—.

Nova jaro! Restu al ni fidelaj ankaŭ en jaro 1935! Ĝi signifos tre gravan jaron en nia movado, ĉar en ĝi ekfunkcias nia internacia organizo reorganizita kaj kun novaj gvidantoj. Bedaŭrinde en nia lando mankos la spertaj kaj laboremaj manoj kaj cerboj de gesinjoroj Sklenĉka. Previzore la komitato akceptos ankaŭ kotizojn por UEA. La UEA-estrarano dro Kamaryt prenos provizore la kontrolon de enkasigo de UEA-kotizoj. Ĉiuj UEA-anoj estis jam legintaj la lastan numeron de „Esperanto". Tie ili vidis ankaŭ la novajn kotizojn. La kotizo de MJ kaj MS restis senŝanĝa, por MA devis esti plialtigita. Ni rekomendas, ke ĉiuj niaj anoj repagu kiom eble baldaŭ siajn kotizojn. Ili povas uzi ĉiujn niajn pagilojn.

Lokaj delegitoj kunvenigu la anojn, rekomendu al ili pagi la kotizojn kaj sendi ilin al ni plej baldaŭ. Ni estos ankaŭ tre dankaj por ĉiuj raportoj pri tio, kiajn opiniojn havas membroj pri la nova stato da UEA kaj kiajn vidmanierojn ili rekomendas al nia asocio.

### Kotizoj por la jaro 1935:

Jenaj kategorioj pagas kaj ricevas:

| | | |
|---|---|---|
| Membro de ĈAE: . . . . . . . . . . | Kč 16·— | Membrajn rajtojn kaj la Bultenon kaj kuponaron de servopetoj. |
| (Lokaj grupoj korporacie aliĝintaj pagas por siaj membroj sole po 12 Kč.) | | |
| Membro kun jarlibro (MJ) de UEA: . | Kč 25·— | La jarlibron. |
| Membro-Abonanto (MA) de UEA: . | Kč 60·— | La jarlibron, revuon „Esperanto". |
| Membro-Subtenanto (MS) de UEA: . | Kč 160·— | La jarlibron, revuon „Esperanto", libran premion laŭ elekto. |

*Dr. A. Pitlík*:

# Antaŭ dudek jaroj.

(Mondmilita rememoro priesperanta.) Fino.

*Ankaŭ en Praha kaj ĉeĥaj landoj okazis same.* El la societoj vivetis sole „Rondeto de esperantistinoj", gvidita de instruistino Šupichová. Samideanoj Cimr kaj E. Kühnl, forveturinte al la pariza kongreso kaj malhelpite reveni hejmen, translokiĝis Hispanujon, kie ili helpadis la porĉenan propagandon, kio kaŭzis, ke Kühnl estis en Aŭstrio kondamnita „in kontumaciam" al morto. Samideanoj Dus, Holeka kaj aliaj mortas en la batalo. Militservas Dr. Fousek, Ginz, Hromada, Lukáš, Pitlík k. a., el kiuj Dr. Fousek kaj Pitlík en oficira kurso en hungara urbeto Pomáz, marŝante unu apud la alia, „ekzercas" diligente ankaŭ en esperanto.

*La aŭstria polico en Praha dediĉis post eksplodo de la mondmilito al la esperantista movado specialan atenton.* En aŭgusto 1914 estis surprizitaj ĉeĥaj esperantistaj funkciuloj en Praha, Kraus, Pitlík, Rosický, Schmidt k. a. per loĝejaj revizioj, kiujn faris detektivoj, provizitaj per ĉiopova dekreto: „Ĉar ĉe Vi troviĝas aŭ povas troviĝi patrujperfidaj aferoj, oni ordonas . . ." Ĉe la revizio la detektivoj insiste postulis precipe transdoni korespondaĵojn, flugfoliojn, broŝurojn kaj librojn, verkitajn de aŭtoro „Kara Samideano". Tial estis konfiskitaj ekzemple ankaŭ fremdlingvaj libroj pri kuirarto, vortaroj pri ekzotikaj lingvoj, preĝlibroj, prezaroj, muziknotoj, mallonge dirite ĉio, kio enhavis la vortojn „kara samideano" aŭ „samideano"! Kelkaj policanoj forportis sian rabaĵon en la poŝo aŭ sub la brako, tiuj pli ambiciaj forveturigis ĝin sur ĉaro. Estas memkompreneble, ke la menciitaj revizioj kaŭzis al la esperantistoj multajn malagrablaĵojn kaj malutilojn: evitadis ekzemple ilin — per unu piedo jam starantajn en la malliberejo — la kunloĝantoj, patriotaj domposedantoj pripensadis ilin malluigi.

Sed ankaŭ la esperantistoj estis surprizitaj per tia vigleco de la polico! Ili ja bone sciis, ke ili en eksterlando uzis esperanton por propagando de kulturaj celadoj de la ĉeĥa nacio, sed tion ili ne konsideris perfido je la aŭstria ŝtato.

Nur 6 semajnojn post la revizio ili ekkomprenis ĉion! Invitite al la policejestro ili eksciis, ke ĉe la poŝtoficejo estis konfiskitaj esperantaj flugfolioj, senditaj Bohemion de Francujo pere de la italaj esperantistoj, kiuj enhavis alvokon „Formetu armilojn", kaj estis surskribitaj per kutima alparolo „Kara samideano". Estas memkompreneble, ke la detektivoj estus fortostreĉe laborintaj, se ili estus forportontaj al policoficejo ĉion, kion la viglaj esperantistoj de Praha helpe de la eksterlandaj „karaj samideanoj" amasiĝis en siaj bibliotekoj kaj hejmarĥivoj!

Estas por historio necese konstati, ke ankaŭ ĉe la Esperantista klubo en Praha oni tiutempe konfiskis multajn valorajn esperantaĵojn, ĝis nun al la klubo de la polico ne redonitajn, kaj ke samideanino Šupichová, kies esperantan kurson por infanoj en „Malý čtenář" oni trifoje grandparte konfiskis, estis ankaŭ invitita al policestrejo.

Pasis longaj kruelaj kvar jaroj, dum kiuj mortas en la j. 1917 la Majstro Zamenhof, pensinte vane per sia „Alvoko al la diplomatoj" haltigi la militon, mortas multmiloj da bravaj samcelanoj falintaj en alia batalo ol esperanta. „Ĉu vi ankoraŭ vivas?" alparoladis sin la esperantistoj dum la unua postmilita universala kongreso, aranĝita en la j. 1920 en Hago, kie post sep jaroj retroviĝis la pioniroj de la esperantista movado por preni al si amike la manojn kaj eldiri la bezonon je koncentrigo kaj sopiron al forta unueca antaŭenpuŝo de esperantismo en la mondo.

Dum la postmilita tempo la esperantista movado rapide kreskas, akiras sukcesojn sur ĉiuj kulturaj kampoj de la homa agado, rekonate de la aŭtoritatoj naciaj kaj internaciaj. Ĝia organizo finiĝas en la j. 1922 per la „Kontrakto de Helsinki" kaj „Interkonsento de Kolonjo", atingita en la j. 1933. Oni ne malesperu, se la solvo de la organiza problemo en Stockholmo 1934 ne ĉiun kontentigis! La organiza afero estas ja ŝanĝebla, sed **nemortebla estas esperanto kun sia praktika aplikebleco kaj interna ideo,** kion pruvis la mondmilito, kiu forigis tronojn, malaperigis ŝtatojn, diversajn movadojn kaj organizaĵojn, sed ne sukcesis mortigi esperanton per sia eksplodo antaŭ dudek jaroj.

---

# Novaj propagandmetodoj.

Dank' al Dio pasis jam tempoj de propagando de nia lingvo per freŝbakitaj samideanoj, kiuj mem lernante ofte gvidis jam ankaŭ kursojn. Ni konfesu malkaŝe: ili tre ofte malutilis al progreso de nia afero. Ne plu estas eble propagandi la lingvon nur pro ĝia facileco kaj intereseco krome tre relativa. Sed ankaŭ ne plu estas necese pravigi Esperanton inter aliaj mondlingvaj sistemoj, iliajn avantaĝojn ni fa-

cile povas rebati: ni ne lernas ian lingvon pro belsoneco, sed pro praktikaj kialoj. Estus malsaĝa komercisto, kiu sciante pri persona bezono de angla lingvo, lernus la francan, ĉar ĝi estas pli belsona. Ĉu la lingvo estas pli perfekta, ankaŭ tute ne gravas. Se oni konas praktikan uzeblecon de la angla, oni ne povas lerni la latinan, eĉ se ĝi estus pli perfekta. Esperanto estas plej uzata — jen la plej grava avantaĝo ĝia.

Sed krom ĉi tiuj refutiloj al kutimaj pretekstoj de propagandistoj de aliaj sistemoj, kiuj (ŝajnas al mi) scias propagandi nur inter esperantistoj anstataŭ serĉi propran medion, mi intencas tuŝi novajn propagandvojojn eksterkursajn. Ŝajnas, ke ni kutime propagandas nur ĉi-direkte kaj ni ne sufiĉe profitas aliajn eblecojn. Estas vere, ke per kurso ni gajnas senpere novajn adeptojn, sed eble ni forgesas, ke antaŭe estas necesa ia preparvojo. Iomete ni aliras ĝin per gazetpropagando, sed ofte ni ne elektas plej trafajn metodojn. Estas tiom da faktoj ne kontesteblaj en Esperanto, per kiuj estus eble bone propagandi — sed ni ne profitas ilin je nia domaĝo.

Unu el ili bone komprenis niaj amikoj en Lázně Bělohrad. Precipe la unua libertempejo estis aranĝita grandstile kaj kun efika helpo de UEA kaj ĝi brile sukcesis. Venis multaj eksterlandanoj kaj lokaj komercistoj por kompreni ilin, lernis nian lingvon en sukcesaj kursoj, kiuj ankaŭ hazarde sed frafe estis aranĝitaj kaj hodiaŭ la klubo minacas aŭ jam efektive okupis la duan lokon en statistiko de kluboj laŭ membronombro. Jen nova metodo! Tute ne paroli pri avantaĝoj de esperanto, sed fari ĝin nepre necesa por privataj interesoj. (Pri specialaj lokaj avantaĝoj mi skribos aliloke.)

Sed ĉu ni ne eraras neglektante jam iomete la aranĝon? Ankaŭ tio estas nia manko, ke ni ne scias esti sufiĉe persistaj. Vi povas ĝui tie tre belan libertempon en interesa regiono inter amindaj samideanoj kaj atentema loĝantaro! Kion diri, se ĉi-jare vi ne venis, se vi povis. Ĉu nur hazardo, ke mankis ĵus pioniroj de la aranĝo?

Pri alta nekontestebla sukceso mi jam menciis dum regiona kunveno en Bělohrad. Niaj universalaj kongresoj estas vere brilegaj propagandebloj el diversaj vidpunktoj. Ni parolis tie pri profitoj, kiajn donas kongreso por la aranĝanta lando, demandante, kial ni ne invitas kongreson. Oni allogas per multekosta reklamo alilandajn turistojn, kaj ni malatentas eblecon venigi proksimume 1500 eksterlandanojn al ni per aranĝo de kongreso. Laboro? Jes, sed ankaŭ multspeca profito. Ĉu oni invitas kongresojn pro belaj okuloj de kongresanoj?

Ankaŭ alimaniere ni povas propagandi la kongreson okazantan en alia lando. Tion ni intencas fari venontjare. „En Romon kaj ĉirkaŭ Italujon perŝipe!" Alloga ekskursprogramo, ĉu ne? Sed ne nur por esperantistoj! Se ni volas propagandi por kongreso, ni ĝin devas montri al neesperantistoj. Ni devas pruvi al vojaĝemuloj, kion ili akiros kiel esperantistoj en eksterlando. Jen praktika eblo sen vortlaŭdoj.

Tiucele mi intencas fari dumvintre propagandan rondvojaĝon tra nia lando pri Italujo laŭ kongresprogramo. Mi kredas, ke mi sukcesos tion fari sub aŭspicioj de nia centro kaj poste mi gvidos karavanon al Italujo ankaŭ kun neesperantistoj! Nur tie oni povas praktike konstati, kia diferenco estas inter ili kaj esperantistoj en eksterlando. Mi kredas ankaŭ tiamaniere favorigi multajn el ili al nia afero.

Ankoraŭ io: nun venis la tempo de kursoj — vintro. Ni bone dum tri kvaronjaroj ripozis! Ĉu tio estas necesa? Ĉu vere ni povas propagandi per kursoj nur aŭtune? Feliĉa mi estas konstati, ke ĉi-jare mi scias jam pri du provoj aranĝi kurson dum somero. La rezultojn mi ne konas ankoraŭ, sed eĉ provoj jam pruvas multon.

Nu, kara leganto, jen kelkaj, rapide ĵetitaj ideoj; eble vi scias pri aliaj. Diru ilin ankaŭ kaj ni kuraĝe ekpropagandu. *Prof. Josef Kožený.*

# Movado.

### Persona informo.

Ne povante plu okupi min pri la aferoj de UEA en Ĉeĥoslovakio, mi petis la Estraron de UEA akcepti mian rezignon je la ĉefdelegita funkcio. Natura sekvo de tio estas likvido de la Teritoria Oficejo de UEA en Hradec Králové, kiu jam komencis.

La Delegitoj, Vicdelegitoj kaj ĉiuj membroj de UEA en Ĉeĥoslovakio estas petataj sin turni en novaj aferoj rekte al la Centra Oficejo de UEA, 1, Tour de l'Ile, Genéve, Svislando, dume la malnovajn aferojn prizorgos mi ĝis plena likvido.

Al ĉiuj, kiuj plene donadis al mia persono fidon kaj amikan kunlaboradon dum la lastaj dek jaroj, mi dankas el tuta koro kaj mi deziras sincere al ili ĉion plej bonan el la estonto. *Otto Sklenčka.*

Ni certe tre bedaŭras tiun ĉi rezignacion kaj ni estus preferintaj, se la tiom meritinta ĉefdelegito ankoraŭ estus funkciinta almenaŭ iom da tempo. Ĉar lia decido estas definitiva, ni ĝis alia aranĝo akceptas provizore ĉiujn kotizojn por UEA el nia ŝtato. Por pago oni povas uzi ĉiujn ekzistantajn pagilojn. La venonta komitata kunveno traktos pri plej taŭga definitiva solvo.

### Komitataj kunvenoj de ĈAE.

La tria okazis 8-an de septembro en Praha. Ĉeestis dro Kamaryt, dro Pitlík, Ginz, Šustr, Sklenčka, Heikenwälder, Hromada, Kožený, Slavík. Prezidis dro Pitlík. La kunveno decidis pri pluraj administraj aferoj. Poste ĝi aŭdis detalan raporton de prez. Kamaryt pri la personaj kaj ideaj vidmanieroj gvidintaj al decidoj en Stockholm. La detalan diskuton partoprenis ĉiuj ĉeestantoj. Ĝi finis per decido informi

niajn membrojn per raporto en la venonta n-ro de la Bulteno. (Ĝi aperis en 5-a n-ro sur p. 32.)

La k v a r a okazis 20-an de decembro 1934 en Praha. — La prezidanto alvokas la komitatanojn al persona aŭ almenaŭ skriba partopreno en la kunvenoj. — Estis decidite peti la grupojn regule raporti pri sia agado, por ke la kroniko en Bulteno estu laŭeble plej kompleta kaj la komitato povu laŭ la raportoj aranĝi siajn laborojn. — Esp. klubo en Bratislava denove donacis al oficeja fondaĵo de ĈAE 300 Kč. — Ministerio por fervojoj eldonis 12-paĝan ilustr. gvidfolion pri ČSR. Krom tio ĝi enmetis en sian broŝuron „Fremdulo sur čs. fervojoj" ankaŭ esp. parton. La tekstojn esperantigis ĝen. sekr. Ginz. — Kooperativa eldonejo „Družstevní práce" konsentas senpage disponigi al ĈAE siajn ejojn por ekspozicio de esp. libro. — S-o Sklenčka rezignis je membreco de la unueciga porstatuta komisiono. Li estas petata daŭrigi la laborojn por ĈAE. — Estas sentata urĝa bezono de nova eldono de slovaka ŝlosilo kaj slovaklingva „Pojítko". — Prez. de esp. klubo de Praha. s-o Šustr priparolas eblon dediĉi iun numeron de Bulteno al Esp. Klubo de Praha okaze de ĝia ĝenerala kunveno. — La kluboj, kiuj korporacie aligis siajn membrojn al ĈAE, estas insiste alvokataj tuj sendi la enkasigitajn kotizojn, posedaĵon de ĈAE, al ĈAE-kaso. — Preskaŭ ĉiuj manuskriptoj por Čs. antologio estas jam en presejo. — Ekspozia materialo de ĈAE estis en Protivín. — Okaze de 50jara ekzisto de la banejo en Lázně Bělohrad, estas aranĝota ekspozicio, kiun partopreni estis invitita ankaŭ la tiea esp. klubo. Ĝi alvokas la esperantistaron en ČSR pruntedoni aŭ donaci tiucele pri- kaj peresperantan konvenan materialon.

**27-a Universala Kongreso de Esperanto 1935 en Italio.** Solena malfermo okazos 5-an de aŭgusto en Roma, fermo la 10-an de aŭgusto en Napoli. Jam antaŭe, la 3-an de aŭgusto estos en Firenze malfermo de Somera Universitato. Ĝiaj prelegoj daŭros surŝipe inter la 10-a ĝis 17-a de aŭgusto dum la Kongresa Krozado tra la Mediteranea maro al Afriko. Kongresa kotizo 205 Kč, sed vi pagos sole 144—185 Kč, se vi aliĝos frue. Kotizo por samfamilianoj 110—123 Kč. Kosto de granda vojaĝo kongresa tra Italio 1020 Kč, de la Kongresa Krozado (Napoli-Siracusa-Malta-Tripolis-Palermo-insulo Elba-Genova) 728—1465 Kč laŭ la komforto dezirata. Aliĝu plej rapide (plej malalta kotizo ĝis 31-a de januaro) ĉe Esperanto-Centro Itala, Milano, Galleria Vittorio Emanuele 92.

---

# Radio.

**Esperantlingvaj horetoj** el Brno, Praha-Strašnice, Mor. Ostrava, Bratislava je 22·12—23-a horo. 3. o k t o b r o: Parolado da d-ro Bláha, prof. de la univ. en Brno: La ĉeĥoslovaka kulturidealo. Arioj de Smetana kaj Dvořák. Radiosceno: Ĉu fabelo aŭ vero? — 7. n o v e m b r o: prof. de la universitato Brno, dro Kallab: Ideoj de la paco. Leterkesto. Smetana. Radioludo de F. K. Zeman. Naciaj kanfoj ĉeĥoslovakaj. — 5. decembro je 22·15 h. Radiofilmo de Chalupa. Leterkesto. — 10. decembro 22·30 Mor. Ostrava: O. Gadula legas sian tradukon de Vojtěch Martínek: La tero sonas. — 17. decembro 22·15 el Brno, Praha, Mor. Ostrava, Strejčková: 100 jaroj de nacia himno. — 2. januaro 1935 22·15 el Brno kaj ceteraj stacioj: Sur rozoj sternite, opereto de Jaromír Weinberger en esperanta traduko. Ludas Trakt kaj anoj de Landa teatro en Brno. — 17. f e b r u a r o 1934 17·15—17·25 (tiam erare ne notite) el Brno Dro Stan. Kamaryt: Filozofio de la lingvo internacia.

---

## Libroj, gazetoj.

**Norda literaturo.** Samideanoj latvaj komencis bonan entreprenon por konigi per esperanto al la tutmondo ĝis nun ne konatan valoran literaturon. Temas pri verkoj, kies tradukoj nur malofte kaj ne facile transiras la limojn de siaj landoj, ĉar tiuj lingvoj estas en la cetera mondo malmulte lernataj. Ŝatantoj de bona literaturo salutos certe kun ĝojo la kuraĝan paŝon kaj ne rifuzos doni laŭeblan subtenon al la kajeroj de Norda literaturo. La Libro-Servo de ĈAE volas zorgi, ke la nova eldonaĵo fariĝu konata en nia lando kaj ĝi varme rekomendas, ke vi akiru la unuan numeron por via biblioteko, La prezo de 84-paĝa kajero estas Kč 5·—, kiun sumeton bonvolu sendi al nia poštčeka k-to nro 12371. La Libro-Servo liveros ankaŭ pluajn kajerojn de tiu serio, kiuj laŭ promeso de la eldonejo havos iom ŝanĝitan kaj pli belan aspekton.

**La Praktiko,** la bele ilustrita organo monata de Internacia Ĉe-Instituto, estas nun abonebla ankaŭ per ĈAE. Jara abono 40 Kč, duonjara 20 Kč.

---

Kiu deziras **korespondi kun japanoj,** skribu al Japana koresponda grupo, Kande, Akasigun, Higo, Japanujo, citante, pri kio vi deziras korespondi aŭ kion interŝanĝi k. s. Vi ricevos de la grupo adresaron de membroj-korespondemuloj kaj via nomo kaj deziro estos publikigita en la bulteno de la grupo. La alsendo de la nomaro de korespondantoj kaj anonco en la bulteno de la grupo estas senpagaj.

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík. - Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. - Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933. - Podací úřad Praha 45.

# BULTENO

## DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA PRAHA

Invitoj, alvokoj, raportoj de ĈAE.
Komitataj kunvenoj de ĈAE.
Kroniko esperantista en ČSR.
Lokaj informoj.
Esperantista vivo.
Movado.
Libroj—gazetoj.
Sciigoj.

*PRAHA, en la jaro 1935.*

Aperas 6 foje dum la jaro. — Eldonanto: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské náměstí 447. — Responda redaktoro: Fr. Slavík. — Presas A. Pražák, Jablonné n. Orlicí. — Gazettarifo permesita per ordono de Poŝt- kaj Telegraf-direkcio en Praha, No 102.047-VII-1933

# Veturiloj por malsanuloj





artefaritaj korpomembroj, protezoj subteniloj, ortopediaj ŝuoj enmetiloj por plataj piedoj ekzercaj instrumentoj

estas fabrikataj sub konstanta kuracista inspekto de

**ODIP**

BRATISLAVA
Vajnorská 2.

PRAHA XIX.
Uralské 9.

En okazo de bezono postulu nian oferton.

---

**Styky s celým světem**

nejsnáze navážete pomocí světového adresáře esperantistů

**BES - ADRESARO**
**de esperantistoj el ĉiuj landoj,**

který vydává BES (Boh. Esp.-Servo) v Potštejně. Adresář z roku 1934 za 7·80 Kč. Přihlášky do nového po 7·80 Kč, s portretem 11·70 Kč. Žádejte obšírný esperantský prospekt zdarma!

---

Plaĉe, fortike kaj malmultekoste bindas librojn

**V. Stehlík,**

librobindisto

**Praha XII.**, Belgická 34.

*Riĉa elekto de fotoalboj.*

*Laboras por la biblioteko de EK. Praha.*

---

Miniaturní, avšak úplná učebnice esperanta se slovníčkem jest

**KLÍČ ESPERANTA.**

Užívejte hromadně pro propagaci!
Cena 60 hal., 100 kusů 50 Kč.

---

Rekomendinda estas vizito de

**KAFEJO LOUVRE**

PRAHA II.,
Národní tř. 20 a.

Sidejo de la Esperantista Klubo Praha.

---

★

**Idilia sommerrestadejo** en mont- kaj arbarriĉa regiono de Norda Bohemio. Romantika ĉirkaŭaĵo. Ĉarma lago por bani. Sablorokaro. Arbarteatro kaj aliaj vidindaĵoj. Ĉambroj por libertempuloj. Aparta tranoktejo por migruloj. Simpla laŭnatura vegetara nutrado kaj vivado en senco de vivreformo. Demandu al:

**VILLA ESPERANTO, Sloup v Čechách,**
217 — Bürgstein.

---

Všem, kdož chtějí hlouběji seznámiti se s vědeckým odůvodněním jazykových zásad esperantských, doporučujeme:

**Esperanto a jeho kritikové.**

Napsal W. E. Collinson, prof. university v Liverpoolu. Stran 24, cena 2·40 Kč. Vydal Svaz čsl. esperantistů.




# HIGIENAJ BEZONAĴOJ

Ventraj kaj herniaj zonoj,
gumaj ŝtrumpoj,
vato, bandaĝa materialo,
ĉiuj sanitaraj helpiloj por malsanuloj

estas liverataj en plej bona kvalito kaj por plej malkaraj prezoj de

**ODIP** **Praha XIX.** Uralské 9. **Hradec Králové** Třída národního vojska.

Laŭ peto ni volonte sendos oferton.

**Plej agrablan someron 1935 vi travivos en**

## Esperanta Libertempejo Lázně Bělohrad.

Kunveno de esperantistoj ĉeĥoslovakaj el diversaj regionoj. Anoncis sin pluraj gastoj el eksterlando. Informojn petu ĉe Esperantista Klubo Lázně Bělohrad.

ĈIUJN
PRESLABOROJN
PLENUMAS PRECIZE
ESPERANTO-PRESEJO
ANT. PRAŽÁK,
JABLONNÉ N. O.

*Konstantin Koutek,*
*officier d'Académie française*
*stát. zkouš. učitel esperanta*

*PRAHA II.*
*Smečky, 28. Telef. 360-09*

*učí francouz. řeči (prakt. věty, správ. výslovn.) zábavnou metodou. Konversace zdarma!*

*Doporučujeme!*